

Jean de La Fontaine,  
Cikado kaj formiko

*tradukita de Antoni Grabowski*

Kantis dum somer' sen fin'  
Cikadin'.  
Kiam frosta vento blovis  
Sen provizo ŝin ektrovis,  
Sen malgranda eĉ pecet'  
Da mușeto aŭ vermet';  
La malsato pelis ŝin  
Al najbara formikin'.  
Kaj ŝi petis kun insisto:  
"Donu grajnojn por ekzisto  
Ĝis la nova jar-sezon'.  
Mi vin pagos, laŭ ordon',  
En Aŭgust', pro best-  
honor',  
La procenton kun valor'."  
Ke ne pekas formikino  
Per pruntemo, estas vere;  
"Kion faris vi somere?"  
Diris ŝi al pruntulino.  
— "Tage, nokte al venantoj,  
Ne mallaŭdu – kantis mi."  
— "Kantis? – gaja jen meti'!  
Nun ekdancu post la kan-  
toj!"

...

Jean de La Fontaine,  
La cikad' kaj la  
formik'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sonis dum somer' kantad'  
De cikad'.  
Kiam venis la jarfin'  
Sen proviz' ĝi trovis sin;  
Ĉar ne estis ie de  
Muș' aŭ verm' pecet', pro  
ve'  
Kaj malsat' ĝi turnis sin  
Al Formik', la najbarin',  
Šin petante pri paner';  
Ĉar grandegis la mizer'.  
"Ĝis la nova kant-sezon'  
Iĝos ja de mi redon'."  
Ĵuris ĝi, "kaj pagos mi  
Interezon ĝis Junii!"  
La formiko, kiu vere  
Ne prundonon ŝatis tre,  
Diris: "Mi ĝin donos ne!  
Kion faris vi somere?" -  
"La pasantojn per muzik'  
Mi ĝojigis ĝis aŭtun'."  
"Mi tre ĝojas, dancu nun!"  
Diris tiam la formik'.

...

Jean de La Fontaine,  
Die Grille und die Amei-  
se

*tradukita de Wilhelm Ernst Dohm*

Grillchen, das den Sommer lang  
Zirpt' und sang,  
Litt nun, da der Winter droht',  
Harte Zeit und bittre Not:  
Nicht das kleinste Würmchen nur  
Und von Fliegen keine Spur!  
Und vor Hunger weinend leise,  
Schlich's zur Nachbarin Ameise,  
Fleht' sie an in ihrer Not,  
Ihr zu leih'n ein Körnlein Brot,  
Bis der Sommer wiederkehre.  
"Glaub' mir," sprach's, "auf Grillen-  
ehre,  
Vor dem Erntemond noch zahl'  
Zins ich dir und Kapital."  
Emschen, das, wie manche lieben  
Leute das Verleihen hasst,  
Fragt die Borgerin: "Was hast  
Du im Sommer denn getrieben?" -  
"Tag und Nacht hab' ich ergötzt  
Durch mein Singen alle Leut'."  
"Durch dein Singen? Sehr erfreut!  
Weißt du was? Dann tanze jetzt!"

...

*Traduko de la Franca poemo “La Cigale et la Fourmi” de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en [http://www.babelmatrix.org/works/frLa\\_Fontaine,\\_Jean\\_de/La\\_cigale\\_et\\_la\\_fourmi/eo/5026-Cikado\\_kaj\\_formiko](http://www.babelmatrix.org/works/frLa_Fontaine,_Jean_de/La_cigale_et_la_fourmi/eo/5026-Cikado_kaj_formiko). Gi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow <http://donh.best.uwh.net>.*

*Pri la tradukinto vidu la vikipedion retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni\\_Grabowski](http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski). Vidu ankaŭ: [http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado\\_kaj\\_formiko](http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko).*

*Traduko de la Franca poemo “La Cigale et la Fourmi” de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983.*

Arg-549-1105 (2010-07-09 23:08:07)

*Traduko de la Franca poemo “La Cigale et la Fourmi” de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en la Germanan de WILHELM ERNST DOHM (Geburtsname: Elias Levy, \*1819-05-24 – †1883-02-05).*

Arg-549-1104 (2010-07-09 22:21:39)

*Pri la tradukinto Wilhelm Ernst Dohm vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm\\_Ernst\\_Dohm](http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Ernst_Dohm).*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-germanigon en la libro “Jean de La Fontaine: Die Fabeln” (Gesamtausgabe in deutscher und französischer Sprache, Emil-Vollmer-Verlag, Wiesbaden.)*